

THE BRITISH ESPERANTIST

WITH WHICH IS INCORPORATED
INTERNATIONAL LANGUAGE

Vol. XXVIII, No. 330.

October, 1932.

A FORWARD MOVE

Last autumn, and in the early part of this year, we introduced economies and alterations with a view to minimising the effects of the world crisis, of which we had then received a somewhat threatening reminder. These steps, coupled with the loyal support of our members, have enabled us to hold our own much better than was anticipated, and apparently our position is now fairly secure.

But are we to be content with holding our own? The Executive Committee think not. Definite progress is necessary if any organisation or movement is to hold the enthusiasm of its members. The real difficulty is to decide in which manner progress can best be ensured, and, when plans have been laid accordingly, how to carry them into effect.

Looking back over the past 25 years, all old Esperantists will agree that our most striking advance was made in the period 1906-8, and that this was largely due to the publicity received in connection with the Cambridge Congress. It should be borne in mind that this publicity was due to exceptional circumstances. Esperanto was then new. The idea of a large number of people from some thirty different nations meeting together for business and social life, and annihilating the language difficulty, fired the imagination of both press and public. As a result, we then secured some of our most important adherents, many of whom have supported us by hard work and finance ever since. The fact that Esperanto was then new to almost everybody accounts for this publicity, and it is because Esperanto has now lost its first appeal and consequent "news-value" that, in the normal course, we are not likely to receive again such valuable publicity free of cost.

Can we achieve it in any other way, and if we can, will it bring the desired results? The Executive Committee think that each question may be answered in the affirmative. An advertising campaign would give the necessary publicity, and the results should be obtained if it is large enough, properly organised, and well followed up. It is suggested that six prominent advertisements should be inserted in the principal weeklies, in alternate weeks, and three in each of the principal monthlies, the campaign lasting therefore for three months. Such a campaign, would, it is believed, bring in thousands of enquiries, to the benefit of the Association, the Federations, and the Groups. It should also lead to the formation of many new groups and classes. And if it were a success, this very success would provide the funds for continuing it, if desired.

"But the cost ! And we haven't the money !" is the immediate reply. Alas, this is true, but difficulties were made to be surmounted. The cost is estimated at about £2,000. It should be possible to raise this sum without hindering our general work, and without calling for any large donations. Indeed, the latter course would be almost futile in these difficult times. But there is a source of possible help which has not yet been tapped.

When speaking to friends about Esperanto you have almost certainly often had the same experience as our Business Manager and other officers of the Association. The reply is very often to the effect that Esperanto is an excellent idea, but the speaker has not the time to learn it at present—whilst others say "Why don't you advertise?" In most cases such people could be induced to support their own opinions to the extent of at least 3d. We have had some booklets prepared, size 2½in. × 6in., containing 40 tear-out tickets printed as follows :—

UNDERSTANDING THROUGHOUT THE WORLD

is greatly hindered by the diversity of tongues. This difficulty can be overcome only by the use of a simple and neutral language for international purposes.

FORTY YEARS' PRACTICAL EXPERIENCE

has proved that

Esperanto Blazes the Trail to Universal Understanding.

In order to bring the facts clearly to the notice of the great mass of British people we are raising a

£2,000 PUBLICITY FUND

and this acknowledges the receipt, with thanks, of **THREEPENCE** donation to the Fund.

For information about Esperanto write your name and address on the back and send to :—

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc.,
142, High Holborn, London, W.C.1.

We shall be pleased to send a book to each member or other Esperantist willing to endeavour to sell these tickets to friends. Given the hearty co-operation of all, we should by this means soon raise the sum required, and more. Note well, too, that every time you sell a ticket you have an excellent opportunity for doing useful propaganda work.

When will the actual publicity scheme be launched ? This depends on the assistance we receive, but we might even be able to start operations by Christmas. The more helpers we secure quickly, the more likely is it that this date will be possible. While the necessary funds are being raised in this manner, we shall not be idle in the office, as we shall have to see that the organisation is ready to deal with the enquiries when they come to hand. Groups and representatives will be necessary in every town, so that enquiries may be referred to them, and classes formed without delay.

It should be added, as this is most important, that the money received from this campaign will not be used for ordinary expenditure, but will be retained intact for the object in view. If you are willing to help,

SEND FOR YOUR BOOK TO-DAY.

Important to Groups and Federations.—This advertising campaign will beyond doubt greatly help the Groups and Federations, as enquiries received from their areas will be sent to them, and this will probably lead to many new members. We therefore confidently anticipate that they will support this scheme to their utmost ability, and we shall be pleased to send a supply of booklets to secretaries for distribution among members.

Note.—To the books of tickets we have added counterfoils containing a space for name and address. When the purchaser would like information about Esperanto, but does not want to write for it, please fill in this information, **but if not, do not write anything on the counterfoils.** When you send these in, we will send out information to addresses given.

Ideas wanted.—The actual advertising will be handled by one of the best advertising agents in the country. Some of our members may have excellent ideas for striking advertisements, and these we should be glad to receive. Assume that an advertisement is to occupy a space about the size of a page of *The British Esperantist*. It may be illustrated, and in that case a rough sketch will suffice. Send such ideas to the Business Manager, B.E.A.

C. C. G.

KRONIKO FAKA

Komerca.—Ciumonate la *Bulteno de la Franca Ĉambro de Komerco en Londono* enhavas artikolon en Esperanto. La numeroj de Junio kaj Aŭgusto pritraktas i.a. Vartrajnan Transporton, kaj la Pligrandigon de la brita fervoja normo necesigotan de la Ŝanel Tunelo.

Medicina.—Aperis grava Medicina Vortaro, havebla ĉe la B.E.A. po 12s. Recenzo sekvas.

Propaganda.—En Parizo, 1–4 Aŭgusto, 30 kongresanoj el 6 landoj diskutis pri propagandmetodoj. Prezidis S-ro F. B. Bourdillon. Oni raportis pri sveda vilago Korüna, kie 300 el la 2,000 loĝantoj estas Esperantistoj.

Metodoj rekomenditaj : Disdono de propaganda literaturo ; gazeta reklamado ; porto de la stelo ; regula kunvenado en restoracio ; kongresoj en urbetoj ; varbado ĉe instruistaj seminarioj ; perfektigaj kursoj por la varbitaj. La individua propagando estas la plej efika.

Rotaria.—Je 17 Aŭgusto S-ro F. B. Bourdillon parolis antaŭ Londona Rotaria Klubo pri Esperanto kaj Internacia Interkompreno. Ni esperas bonan frukton el tiu semado.

VARIA

24-a Brita Kongreso, Oxford, 14–17 Aprilo, 1933. Jam aliĝis kelkaj membroj, inter kiuj S-ro R. H. Geoghegan en Alasko, la pioniro de Esperanto en Britujo. Imitu tiun bonan ekzemplon kaj aliĝu nun. Sek., J. F. Brendel, 59 Dene Rd., Headington, Oxford.

“Service.”—The Autumn *Quarterly Quarrel* is between Mr. C. K. Ogden (Basic English) and Mr. F. B. Bourdillon (Esperanto). The general impression left is that of untried theory on the one hand against fact and experience on the other. Mr. Bourdillon also has a good article in *APA News Bulletin* (July).

Esperanto in Sweden.—The annual report of A.B.F. (the Swedish W.E.A.) shows that Esperanto has now more students than any other language. Classes (with Government support) were :

	1930-1.	1931-2.
Esperanto	299	432
English	303	344
German	59	115
French	4	9
Russian	1	1

The average enrolment for a class is 12 : in the Esperanto classes the average enrolment is 15. This shows 6,800 Esperanto students last winter.

LA MELKISTINO.

DUETO.

(Angla Popolkanto.)

Traduko kaj Muziko de MONTAGU C. BUTLER, L.R.A.M.


SI.

Gamo G. LI.

{| s₁ :m₁ :s₁ | d :d :d | r :d :r | m :d || m | s :m :r }



1. "Ki - en vi i - ras, ho be - la fraū - li - no?" "Mi i - ras por
2. "Ki - o la pa - tro de vi, be - lu - li - no?" "Li es - tas farm -
3. "Ki - om da do - to por vi, be - lu - li - no?" "Mia dot' la vi -



{| d :t₁ :d | r :m :d | t₁ :l₁ || s₁ | s₁ :m₁ :s₁ | d :d :d }




mel - ki," res - pon - dis la i - no. "Cu ku - ne ni i - ru? Per -
- is - to," res - pon - dis la i - no. "Cu mi, ka - ru - li - no, ed -
- za - ^go," res - pon - dis la i - no. "Ha! Ne po - vos mi, do, ed -



{| r :d :r | m :— || m | s :m :d | l₁ :s :f | m :f :r | d :— ||

D.S. AMBAÜ.

- me - su al mi - " "Jes, cer - te, Sin - jo - ro, se plia - cos al vi."
- zi - ^gu kun vi?" "Vi fa - rus ho - no - ron al mi," di - ris SI.
- zi - ^gi kun vi." "Ne - ni - u ^gin pe - tis, Sin - jor," di - ris SI.



INTERLUDO.



REVISED AND ENLARGED EDITION.

The "Edinburgh" Esperanto Pocket Dictionary

Esperanto-English, and English-Esperanto.

Edited by JOHN MABON WARDEN, F.F.A., President of the Esperantista Akademio, with the collaboration of Miss JANE BAIRD, F.B.E.A., and WILLIAM HARVEY, I.S.O., L.K.

Convenient pocket size, $6 \times 3\frac{1}{2}$ inches. 288 double-column pages set in clear type. Cloth, 2/6 net.

Obtainable from all booksellers.

THOMAS NELSON AND SONS, Ltd.
LONDON AND EDINBURGH.

"ESPERANTO IN OUTLINE"

A NEW TEXTBOOK-READER
by R. A. M. KEARNEY, B.A.

Continuous text in Esperanto illustrating grammar and structure, with full Directions and Index.

Price SIXPENCE from B. E. A.
(Postage 1d.)

**EVERY
READER SHOULD HAVE
A COPY OF
"Proverbs:
Esperanto-English**

This is an ideal book for a gift or for the pocket. On the left-hand page are the Esperanto Proverbs, while facing are equivalent English Proverbs.

*Velvet Persian Yapp or Smooth Antique Leather Binding, 1/6 net,
post 3d.*

**LEICESTER CO-OPERATIVE
PRINTING SOCIETY LTD.**
CHURCH GATE, LEICESTER

● SPECIALISTS in the production of Book Work, Magazines, Pamphlets, Leaflets, Folders, &c.

● PRICES—LOW ● QUALITY—HIGH
● SERVICE—THE BEST

London Office & Works
58 GOUGH STREET, GRAYS INN ROAD, W.C.1

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.,
142 High Holborn, London, W.C.1.

LA KONSPIRO

*Geroluloj : Johano, Georgo, Filipo, Janeto. Tempodaŭro : 6 minutoj.
Scenejo : Stratangulo.*

Georgo staras kun floro en la butontruoj. Eniras Johano.

- J. Tagon, Georgo. Vi aspektas tre feliĉa.
G. Jes, kaj mi sentas min tia. Mi estas plena de printempa ĝojo.
J. Kio okazis?
G. Mi enamiĝis.
J. Enamiĝis! El ĉiu malsaguloj sub la suno, vi certe—
G. Jes, enamiĝis kun la plej bela fraŭlino en la tuta mondo.
J. Ho, jes, kompreneble! Ili ĉiu estas tiaj.
G. Atendu, ĝis vi vidos. Vi devos konsenti. Mi havas ŝian foton ĉi tie. Rigardu kaj konvinkigu. (*Transdonas ĝin*). Ĉu mi eraris? Ĉu ŝi ne estas bela? Ĉi vi iam vidis pli belan? Tiuj okuloj! Tiuj haroj! Tiu delikata haŭto! Tiu mentono! Tiuj lipoj! Ha, mia anĝelo!
J. Haltu! Haltu momenton! Tiu ne estas via fraŭlino. Si estas mia.
G. Kio? Via? Rubajo! Si estas mia—mia por ĉiam kaj eterne. Vi eĉ ne konas ŝin.
J. Konas ŝin? Mi promenis kun ŝi hieraŭ vespere. Kaj plue, ŝi promesis edziniĝi kun mi.
G. Neeble! Si akceptis min antaŭhieraŭ.
J. Ĉu vere? Vi ne ŝercas?
G. Mi juras. Ni ĉeestis la teatron, kaj, promenante hejmen, ni aranĝis fianĉiĝi je Kristnasko.
J. Si ne povas edziniĝi kun ambaŭ.
G. Si devas edziniĝi kun tiu, kiun ŝi pli amas.
J. Bone. Do kun mi.
G. Ne! Mi, nepre.
J. Mi havas ideon. Ni provu ŝin. G. Kiel?
J. Aŭskultu. Ni ŝajnigos, ke okazis fervoja akcidento, kaj ke ni ambaŭ mortis. Kiam ŝi aŭdos pri la afero, ŝi certe ekkrios la nomon de tiu, kiun ŝi pli amas, jene—(*imitante*) "Ho mia Johano!"
G. Ne, jene—"Ho mia kara Georgo!"
J. Ni ne argumentu pri tio. Ni baldaŭ konstatos.
G. Sed kiu informos ŝin? Ŝi alvenos post du minutoj.
J. Jen venas Filipo. Ni haltigu lin, kaj klarigu al li la konspiron. Eble li konsentos helpi nin. (*Eniras Filipo*). Tagon, Filipo.
F. Tagon, Johano. Tagon, Georgo.
G. Filipo, ĉu vi bonvole donos al ni vian helpon?
F. Mi donos ion ajn, krom mono.
J. Ne estas mono, kion ni bezonas. Aŭskultu, dum ni klarigos. Ni ambaŭ amas Janeton.
F. Ne Janeto Kilraŭ?
G. Neniu alia. Kaj—por eltrovi tiun, kiun ŝi pli amas—ni deziras, ke vi diru al ŝi, ke ni ambaŭ mortis en fervoja akcidento.
F. Sed kiel tio utilos?
J. Ĉu vi ne povas diveni? Tuj kiam ŝi aŭdos pri la okazajo, ŝi certe ekkrios la nomon de tiu, kiun ŝi pli amas, jene—"Ho mia Johano!"
G. Ne, jene—"Ho mia kara Georgo!"
F. Vi ne havas tempon diskuti pri tio, ĉar jen ŝi venas. Kašu vin tuj, kaj mi ŝin haltigos. (*Flanke*) Baldaŭ vi scios, kiun ŝi elektis. (J. kaj G. kaſigas. *Eniras Janeto*).
Bonan tagon, Janeto. Mi havas novajon por vi.
J. Bonan novajon, mi esperas.
F. Vi jugos pri tio. Johano kaj Georgo mortis en fervoja akcidento.
J. Kio? Ambaŭ mortis? Tiuokaze ni povos edziĝi tuj. (Dum F. tenas J. en la brakoj, du konsternitaj vizagoj reaperas el la kašejo). (Kurteno).

ROBERT MACKAY.

OUR BOOKSHELF

Books starred are stocked by the B.E.A. Postage extra. Others should be ordered not from the B.E.A., but from the address given.

**Scienca Fundamenta Esperanta Terminaro*.—*Rollet de l'Isle*. 100 pp., 6s. 3p.

This publication, issued (in a limited edition) by the *Internacia Scienca Asocio Esperantista*, forms a valuable work of reference. The terms, of which there are in all some 1,500, relate to the chief mathematical, physical, and natural sciences, and thus cover a wide field. The main part of the book consists of concise definitions of the various terms, supplemented by French equivalents, and the remainder of an alphabetical list of the majority of them, cross-referenced to the definitions themselves; so that users of the work can be quite clear as to the sense of every word.

The terms have been selected mainly from those actually used in the technical literature of Esperanto, and the great majority of them may be regarded as already standardised. In a few cases authors may in practice prefer to employ forms differing somewhat from those here given, but the work as a whole supplies a reliable fundamental vocabulary of Esperanto technical terminology—and, moreover, enables a very large number of derivatives to be formed as required. The complete adaptability of the international language to science cannot be doubted by anyone who gives even a cursory glance at the clear and well-printed pages of the book.

En estonta eldono, estus bone eviti nefonetikajn formojn: (ekz., *ohmo*: *omo* tute taŭgas), kaj korekti kelkajn preserarojn (ekz., *zangifero*, *fragilego*).

BERNARD LONG.

Esperanta Paradigmaro.—D-ro Robert Raupp. 45pp., kun sama nombro da blankaj paĝoj por notoj. Plejparte konsistas malpli el paradigmoj, ol el ilustraj frazoj kaj notoj, kiajn inteligenta lernanto farus dum leciono. Eble kun klarigoj de instruisto ĝi povus utili, tamen ĝi enhavas multe da kritikindajoj, malklaroj, kaj preseraroj. Ce la aŭtoro, poštcekkonto 3001, Ludwigs-hafen ĉe Rejno, Germanujo, po 1.50 sv. fr. U.E.A. kuponoj uzeblaj.

***Petro**.—Kursa lernolibro por laboristo. 5-a eldono, plene reverkita kaj plibonigita. 116 pp. 1s.

Kompleta Fundamento de l' Idiomo "Mondiala" or "Nov-Esperanto" da Antido. Gramatiko ey Vortaro. 136 pp., 2s. 6p., ĉe D-ro Rene de Saussure, Genevo.

Denove, post multjara eksperimentaro kaj konstanta reformado, la aŭtoro prezentas al ni la finfinan definitivan formon de sia lingva projekto.

Al S-ro de Saussure ni ŝuldas la unuan seriozan kaj sciencan esploron pri la strukturo de Esperanto. Lia genio eltrovis la teorion, kiun ni ĉiuj nun proprigas aŭ plagiatis. Estas li, kiu pravigis nian fidon en nia lingvo kaj instruis al ni ĝin kompreni. Estas li, kiu donis la mortbaton al la pretendoj de Ido. Kredeble neniu vivanto tiel majstre kaj fundamente studis la bazon de Esperanto, kiel li.

Lia nuna volumo, do, havas nepran intereson por la teoriisto. Kelkaj ideoj, ekz., la tabelo de lokaj prepozicioj, estas surpapere admirindaj. Tamen oni ricevas la fortan konvinkon, ke malgraŭ ĉio, la fina rezulto de tiom da esplorado malsuperas Esperanton. Estas preskaŭ nekredeble, tamen vere, ke homo tia proponu (ekzemple) fleksian akuzativon.

Oni povas nur bedaŭri, ke la sciencia eksperimentemo de S-ro de Saussure lin forkondukis sur flankan vojon: allogan, sed nenien kondukantan en la praktiko. Ni esperu, ke li baldaŭ ĉesos malsparsian talenton ĉasante ombrojn, kaj ree ĝin dediĉos al la servo de Zamenhofa Esperanto. En la koro, efektive, li ĉiam restas inter ni.

Hungary.—A selection of works about Hungary in 20 different languages—160 pp., 3s., ĉe Bela Kemeny, Jozsef-körut 5, Budapest VIII. Tre plena bibliografio kun detaloj de 2100 verkoj pri Hungara nacio, vivo, lando, lingvo kaj muziko, kaj ĉapitro dediĉita al verkoj en Esperanto. (Mankas tamen mencio pri Esperanto-hungaraj vortaroj).

Eszperanto Kulcs.—Nova kaj plibonigita eldono de la hungara "slosilo." 32 pp.

La Servaro.—Inspira kaj konvinka priskribo pri la multflanka laboro de la U.E.A., kun multe da utila informo. 96 pp.

Lernolibro de Esperanta Stenografio laŭ sistemo Dupluye. 4-a eldono. 16 pp., 1 respondkupono, ĉe P. Flaguel, 9 Bd. Voltaire, Issy-les-Molineaux, Seine, France.

***Esperanto in Outline** (Kearney).—6p.
*Jen resumo de recenso ricevita tro malfrue
por nia lasta numero (V.p. 253).*

Kiel paralela legolibro ĉi tiu malsukcesas, ĉar la aŭtoro ne nomas la lernolibron, al kiu ĝi paralelu; estas neeble, ke ĝi paralelu ĉiujn samtempe. Kiel lernolibro ĝi estas tro konciza, ĉar la amaso da novaj vortoj superĉutas la lernanton; en la dua leciono oni trovas 68 vortojn en 68 frazoj. La vortoj lernotaj devus esti malmultaj, por ke la komencanto lernu facile ludi kun ili. Krome, ili devus esti la plej oftaj kaj la plej utilaj por la frazkonstruado; tial oni evitu *turdo, heni*, k.s. Pri dependaj subfrazoj S-ro Kearney prave montras ke post *diri, demandi, anonci*, oni konservas la saman verbotempon, kiun oni uzus, se la subfrazo estus ĉeffrazo. Sed la sama regulo validas ĉe ĉiu verbo esprimanta silentan mensan procedon: ekz. *vidi, kredi, signifi* (p. 40), kaj *opinii, supozzi, kompreni, konstati, diveni, esperi, timi*. Pri propraj nomoj apoziaciaj, ni rimarkas (21, 22) *fraton Frederiko . . . fratinon Sofio . . . filon Ernesto*, sed (29) *amikon Erneston*, (32) *urban Sirakuson*, (41) *la lingvon Esperanton*. Prepozicio malprave trudigas en la frazon *urbo de Bialystok* (40). Akuzativon postulas la verboj *trempo* (16, 17) kaj *meti* (35) montrante movadon aŭ direkton. Tamen la libreto havas apartan valoron kiel resumo de Esp. gramatiko kun sufici ilustra materialo por montri la fleksiblecon de la lingvo kaj ĝian kapablon esprimi nuancojn.

ERIC G. MAWSON.

Dekcenda Serio.—Redaktanto: A. Kengott. **I. La Fantoma Edzino.**—Edward Payson. Bona fantazia rakonto, simple esprimita. Rekomendinda al tiu, kiu deziras legi facilan kaj interesan originalajon. **II. Rübezahl.** Hilde Scholze. Poezia rakonto pri germana legendo. Longa poemo, plena de prinaturaj bildoj. Taŭga por infano aŭ komencanto. La multaj kunmetitaj vortoj instigas al pensado, sed iomete malhelpas tujan komprenon. **III. Usono.**—A. Kengott. Interesa legaĵo; sed ne tio, kon oni atendas. Priskribas nur kelkajn scenojn de Usona vivo. La aŭtoro altrudas personajn juĝojn pri siaj samlandoj, kaj pri alilandaj moroj kompare kun Usonaj. Ĉe Prof. A. Kenngott, University of Texas, Austin, Texas, U.S.A.

V. C. N.

Esperantlingva Novelbiblioteko.—Jam aperis tri volumoj: N-ro 1, **Eksiĝo** (Naum Jerušalmi), elhebreigita de L. Vienano; N-ro 2; **La vizio, La vesto** (B. Prus), elpoligitaj de Lidja Zamenhof; N-ro 3: **La Mistero, Unu horo** (P. Romanov), elrusigitaj de Isaj Dratwer. Ĉiu 30–40 pp., po 0.3, 0.45 sv. fr., ĉe N. Ŝapiro, Nowolipki 8, Warsaw.

La serio celas provizi novelojn (a) interesajn, (b) facilajn, (c) internaciajn, kaj (d) verkitajn en flua modela Zamenhofa stilo. Interesaj ili certe estas, kvankam volumoj 1 kaj 3 ne tre taŭgas por kursa legado. "La Vizio" estas aparte bela. Sufiĉe facilaj, bonstilaj, kaj ĝenerale rekomendindaj ili estas ankaŭ. Tamen vortoj kiaj *patrio*, definitive malrekomenditaj de Zamenhof kaj de la Lingva Komitato, ne rajtigas la pretendon (d). Notindaj formoj (kelkaj estas bonaj): *deprimi, fabrikejo, fini la lernejon, impete, kontinuigis (=daŭrigis) la doktoro, plenumenda laboro, senso, sublima* (ne: *sub-lima!*). Kial kvazaŭ pardonpeti pri uzo de *ci*? Kial *ordi* (*ordigi*) la ĉambron? *hrizantemo?* *atlaso* (=ŝtofo, ne bildaro)? Genas *deposit*, kiam la aŭtoro jam uzas *eke de kaj ekde*; ankaŭ la ŝanceligado inter *Jehio* kaj *Jehio*.

F. E.

La Reestigo de Nacio.—*Raporto prezentita al la 24-a Kongreso de Esperanto "kiel signo de simpatio" kun "movado celanta pacon kaj interpopolan komprenon."* 24 pp., riche ilustritaj. Senpage, laŭ peto al Cionista Organizaĵo, 77 Gt. Russell St., London, W.C.1.

Bele eldonita raporto pri la agado de la Hebreoj en Palestino. Oni legas pri fondo de nova urbo (Tel-Aviv) kun 45,000 loĝantoj; enmigrado de 120,000 Hebreoj el ĉiuj landoj; revivigo de la antikva Hebreo lingvo; Hebreo Universitato, kaj Hebreo Biblioteko (kun specia kolekto da libroj pri Esperanto). Ni gratulas la Organizaĵon pri sia iniciativo eldoni la bonstilan verkon, kaj rekomendas, ke oni ĝin havigu.

Tri Rakontoj (El "Impresoj de Vojaĝoj"). Alexander Dumas. Trad. E. Deligny. 41 pp., afrankite 4 fr. fr., ĉe S-ro Deligny, 4 Rue Allent, St-Omer, P. de C., France. La traduko ĝenerale estas tre bona. Domage estas, tamen, ke oni lasis resti tiajn senzorgajojn kiaj *pulvo* (=polvo); je via *servico* (=servo); mi ne volas *signifi* (=komprengi); naŭ frankoj *potage* (=?).

***Trans la Fabeloceano.**—F. Szilagy. Eld. "Literatura Mondo." 134 pp., broš. 3s. 3p.; bind. 5s. 6p.

Jen libro en bonega facile legebla Esperanto. Komence troviĝas ok fabeloj novmodaj. Inter la karakteroj de la antikva fabelo (birdo, kapro, lupo, drako, akvo, fajro, k.t.p.) sin miksa modernaj roluloj—bankdirektoro, advokato, juristo, eĉ aŭtomobilo. Sed la leganto devas diveni la kaſitajn signifojn, inter kiuj ŝajnas esti: la potenco de mono; la vaneco de konferencoj fronte al urĝegaj homaj bezonoj; la netolerebla Ĝeno kaŭzata de la naciaj landlimoj; la premega malriĉeco de nuntempa Eŭropo; la malmoligo de la homa koro pro avaraco. Sekvas ses skizoj: fantazio pri la infanjaroj de Zamenhof; rakonto pri geedza feliĉo rompita de ebria vizitanto; freneziĝo de maljunulino pro malsato kaj frostiĝo; unua knaba provo al ekamo; malpeza ero pri bojanta hundo sur ponto; kaj paskvileto pri la redaktejo de "Literatura Mondo," plej komprenebla al Budapestanoj. Inter strangaj uzoj de la lingvo estas: *elgibigas* la okuloj; *muka* urbo; pantalono estas *stopita* (*flikita*); la vivovolo *metas* en ŝi; mi vidis en la *kamero* ĉokoladon; morgaŭ ni amos *kaj punkto*. Misuzoj estas: *sufloris* (*flustris*), pp. 40, 70; *miris* (*scivolis*, *demandis min*), p. 110; *deiris* (*malsupreniris*) la ŝtuparon, p. 123. Neoficialaj estas: *fatmorgano*, *strando* (*marbordo*), *lici*, *darfi*, *ascendi* (*supreniri*), *plastrono* (?), k.a. La aŭtoro ne komprenas la prepozicion *po*: (p. 62) *tri mortintoj pro malsato po minuto* (t.e., ĉiu el ili bezonis minuton por morti!); (p. 69) *restadi ok horojn potage* (kiu povas signifi nur, ke ĉiu horo enhavis tagon!) La ĝustaj esprimoj estas *čiuminute*, *čiutage*. Legante la libron, oni havas impreson pri "ega" kvanto da vortoj, sub kiuj kaſigas "eta" perlo. Tamen legu kaj trouu.

E. G. M.

Peko de Kain.—Novelo originale verkita de I. Sirjaev. Eldonita per helpo de kelkaj amikoj; ricevebla ĉe Literatura Mondo, Mesterutca 53, V, 7, Budapest IX. 36 pp. 0.20 dolaroj. Ci tiu verketo de unu el niaj pioniroj (Ivan Malfeliĉulo) estas interesa, kaj lingve tre bona. Gi estas libro, kiun oni ne facile legos objektive. Oni varme konsentos, aŭ forte indignos, laŭ siaj kredo pri milito kaj pri la pekforiga efikeco de sinmutilado.

VARIA

California University had an extension course in Esperanto in the spring, and will have four in the autumn.

"**The Yorkshire Observer**" continues the Esperanto lessons by Mr. G. Luscombe. This very fine series is obviously the fruit of much learning and thought; it ought to be reprinted in book form.

The British and Foreign Bible Society to date 31 Dec., 1931 had sold 8,444 Bibles, 22,727 Testaments, and 14,231 Psalms and Gospels in Esperanto.

Nelson Weavers' Association is running a daily Esperanto course for strikers. The number of students enrolled exceeds all expectations. Other classes for the unemployed might well be started in other districts.

Sheffield Public Libraries issue a list of 230 Esperanto books on their shelves available for readers. If every group (why not every member?) would make a requisition for Esperanto books to the local library . . . ! DO IT NOW.

Notable additions to the B.E.A. Library are *Lingvo Internacia* (1896-9), a gift by Akademiano P. Nylen of Sweden, and the *Index to Decimal Classification*, and other volumes, by Mrs. D. H. Morris. To both heartiest thanks. Mr. Nylen needs *Eklezia Revuo* (Vol. I., Nr. 1) to complete his collection. Can anyone help?

The Sibylline Language.—While I was reporting a local carnival the other day, my attention was directed to the posters erected by a clairvoyant and palmist to attract customers. Among other things there was a large diagram of a hand, with all the lines marked and labelled. Then I noticed that one of the lines on the index finger was labelled:—

La Signo de la Lingvo estas tie ĉi.

My Editor was with me, and I asked him if he knew what the language was. "No," he said, "but it looks like Spanish." "It isn't," I replied. "It is Esperanto, and reads: 'The Sign of Language is here.'" I thought this rather ingenious. It would be interesting to know how far Esperanto is recognised by any of the societies dealing with occultism.

D. A. BLOXHAM,
Wood Farm, Essington, Wolverhampton.

GROUPS AND SOCIETIES AFFILIATED TO THE B.E.A.

Order of Information.—Group; Secretary; Place of Meeting, Day, and Hour.

Some groups make other arrangements for the Summer months.

- Aberdeen.**—Miss J. Mellis, 28 Whitehall Place.—The Training Centre, St. Andrews St., 2nd and 4th Fri., 8.
- Accrington.**—L. Birtwistle, 64 Pansy Street.—Rechabites Hall, Abbey St., Tues., 7.30.
- Alton.**—Mrs. E. Sheldon, Windmill Cottage.—Hilltop, Ackender Rd. Tues., 8.
- Banbury.**—Miss Rake, 5 Broughton Terrace.—Christ-church Chapel Schoolroom, Horse Fair. Tues., 7.
- Barry (Glam.).**—Miss A. D. Langstone, 6 Gaen St.—61 Porthkerry Rd. Mon., 7-9.
